

Enhavo

- **anoncoj**

Terpomuloj eble vizitos vin!; Free downloads from the *retbutiko*; New titles in the *retbutiko*; KoToFesto featured on Public Radio; Automatic payments now available at the E-USA store; Used titles from the book service

- **Honore al la memoro de David**

RICHARDSON

omaĝoj - Arlyn Kerr

- **Three Little Words**

instruado - D. Gary Grady

The tiny words *da*, *po*, and *si* cause students of Esperanto trouble out of proportion to their size. None of them has an exact equivalent in English, and rules for using them can be confusing enough as to require some explanation. Even experienced speakers sometimes misuse them.

- **Raporto de la Mez-Kanada**

Renkontiĝo

vojaĝe tra la mondo - Margo Cohen

Kvankam ŝi eklernis Esperanton nur antaŭ tri semajnoj, ŝi jam parolas kaj komprenas tre bone. Ŝi uzis nur libron pri Esperanta gramatiko, kaj neniam parolis Esperanton antaŭ ol ŝi alvenis al Mekaro! La ĉefa kialo por ŝia decido ekstudi Esperanton, diris al mi tiu rusdevena junulino, estas la nuna politika situacio en Ukrainujo. "Mi volas la pacon", ŝi diris.

- **leterkesto**

Ĉu la fina venko?

- **Pasio**

de la prezidanto - Orlando E. Raola

Finiĝis la lernoĵaro. Bonŝance mi mergiĝas nun en la someran feriadon. Libertempa somero certe ebligas al mi serioze okupiĝi pri mia ŝatokupo: Esperanto. Tiu ĉi somero verŝajne estos plenplena je tio, kaj mi jam ve-sopiretas, ke ĝi ne estos sufiĉe longa por sukcesigi ĉion, kion mi volus fari.

- **Raporto de la Simpozio pri Lingvo kaj Egaleco**

loke - Humphrey Tonkin

La simpozio, ĉe United Nations Plaza, Novjorko, okazis sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), la Laborgrupo pri Lingvoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj la Universitato de Hartford. Universala Esperanto-Asocio rolis kiel la gastiga organizaĵo, kun parta subvencio de Esperantic Studies Foundation.

- **Apokalipse**

beletre - Lee Miller

Mi ne konsciis / en tiu tago / ke en la mano mi tenis / signalon de la fino...

- **Ĉu vilaĝo efektive vizitinda?**

senintenca esperantaĵo? - Christopher Zervic


Dankon al Chris ZERVIC pro lia foto el la Adirondakaj montoj de Novjorkio. En siaj vojaĝoj, Chris foje trapasas simile allogajn vilaĝojn — ekzemple la trankviligan Murdo, en Suda Dakoto.

ISSN: 1056-0297Usona

Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2014:3 (maj-jun)

Esperantist



Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2014:3 (maj-jun)

Ĉi-numere:

- *Anoncoj:* Ĉu vi pretas por la terpomuloj?
- *Instruado:* Three little words
- *Vojaĝe:* Raporto de Mekaro
- Kaj pli...

Honore al la memoro de David RICHARDSON

Terpomuloj eble vizitos vin!

Anna kaj Larry BENNETT, terpomuloj de Idaho, vendis sian domon en Boise, kaj nun vojaĝas tra Usono kaj Kanado. Ili loĝas en ruldomo 200 kvadratajn futojn granda. Dum la unuaj ok monatoj de la vojaĝo ili vizitis 16 ŝtatojn (ĉiuj estas okcidente de la rivero Misisipo). Dum la tuta tri-jara vojaĝo ili planas viziti 49 usonajn ŝtatojn kaj la plejparton de la kanadaj provincoj.

Ĝis nun, ili renkontis esperantistojn en Koloradio, Novmeksiko, Arizono, Kalifornio, kaj Teksaso. Ili partoprenis Esperanto-renkontiĝojn en Santa Fe, Novmeksiko kaj en Dalaso, Teksaso, kaj interŝanĝis retmesaĝojn kun esperantisto en Arkansaso.



Larry kaj Anna (maldekstre) kun Elizabeto kaj Filipo DORCAS en Fort Worth, Teksaso.

Larry kaj Anna uzas la membroliston de Esperanto-USA por kontakti homojn kaj aranĝi renkontiĝojn por kafumi, turisti, aŭ kunmanĝi. Ne surpriziĝu, se vi ricevos mesaĝon de ili antaŭ ilia vizito al via ŝtato aŭ provinco. Eblas kontakti ilin kaj rete <anna.bennett@esperantic.org> kaj telefone: 208-863-4952.

Free downloads from the *retbutiko*

Newly available downloads are now available free to members (100% discount) at our online bookstore [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>]:




• KRISHNAMURTI - LIBERO KAJ LERNADO

Jiddu Krishnamurti, tradukis Kribo. Unua prelego de Krishnamurti, fama filozofo, dum trejnseminario en Saanen, Svisujo, 1964. La kunpremita dosiero enhavas la bitlibreton en formoj PDF, EPUB, kaj MOBI. \$2.00

New titles in the *retbutiko*

• BELETRA ALMANAKO 18

Diversaj aŭtoroj — Prozo de Laroca, Steele, Tófalvy. Poezio de Nicholas kaj Fernández. Tradukoj fare de Kerziouk, Russ WILLIAMS, kaj Reyna. Eseoj de kelkaj aŭtoroj. Rimarku: verkoj de du membroj de E-USA aperas en ĉi tiu kolekto: Russ WILLIAMS tradukis, ka Steve BREWER verkis eseon. Mola bindaĵo. 139 paĝoj. 2012. USA. \$10.00



Order from *Esperanto-USA*, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, or online [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

KoToFesto featured on Public Radio

NPR [*National Public Radio*] affiliate KPLU in Seattle did a feature story on the *Kino-Teatro-Festivalo* [<http://kotofesto.org>] held on Washington's Whidbey Island in April. Organizer Jennifer Bondelid was interviewed by reporter Rae Ellen Bichell:



For Bondelid and her fellow Esperantists, it's a matter of practicality. They say this language is accessible, and, unlike our clunky mother tongue, it's easy to learn. That's largely thanks to

the Internet.

For the entire interview, see KPLU's streaming audio page [<http://www.kplu.org/post/esperanto-speakers-gather-whidbey-island-celebrate-languages-arts-scene>].

Automatic payments now available at the E-USA store

Now you can donate money to your favorite fund (NASK, 777 Fund, General Fund, etc.) every month or year automatically.




Also, you can automatically renew your E-USA membership, your UEA membership, and magazine subscriptions every year.

Full details are at the online store [http://esperanto-usa.org/retbutiko/index.php?main_page=page&id=16]

Used titles from the book service

Newly available used books from our bookstore [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>]. Members receive a 25% discount on all used items.



- **KROATA MILITA NOKTLIBRO**
De Spomenka ŠTIMEC. Mola bindaĵo, bona stato. 103 pĝ. 1993. Sperto de unu virino dum la Balkana milito. \$15.00
- **RAPORTOJ EL JAPANIO 11**
De JORI Jasuo. Mola bindaĵo. Bona stato. 176 pĝ. 2008. Pli ol 20 raportoj kaj eseetoj pri japana vivo. \$15.00
- **RAPORTOJ EL JAPANIO 9**
De JORI Jasuo. Mola bindaĵo. Bona stato. 182 pĝ. 2006. Raportoj kaj eseetoj pri japana vivo. \$15.00
- **BELETRA ALMANAKO**
Mola bindaĵo. Bona stato. 144 pĝ. 2008. Prozo

kaj poezio, originalaj kaj tradukitaj, eseoj, recenzoj kaj multe pli. \$15.00

- **BELETRA ALMANAKO 3**
Mola bindaĵo. Bona stato. 175 pĝ. 2008. Prozo kaj poezio, originalaj kaj tradukitaj, eseoj, recenzoj kaj multe pli. \$15.00
- **BELETRA ALMANAKO 4**
Mola bindaĵo. Bona stato. 139 pĝ.. 2009. Prozo kaj poezio, originalaj kaj tradukitaj, eseoj, recenzoj kaj multe pli. \$15.00
- **FUNDAMENTA KRESTOMATIO**
Hardcover. Good condition. 439 pages. 1992. Essays, short stories, poems etc., whose goal is to give the reader a model of proper Esperanto style and usage. Notes by G. Waringhien. Eighteenth edition. Dust cover is worn and slightly torn. \$10.00
- **LINGVO KAJ VIVO**
G. Waringhien. Hardcover. Good condition. 450 pages. 1989. Elegant collection of studies about the sources and structure of Esperanto; one of the main works of Esperantology. Number 3 in the Jubilee collection "Jarcento de Esperanto". Second edition. Dust cover slightly worn. \$10.00
- **PLENA VORTARO KUN SUPLEMENTO**
De E. GROSJEAN-MAUPIN. Mola bindaĵo. Bona stato. 558 pĝ. 1996. Vortaro por ĝenerala uzo, kun difinoj en Esperanto. \$25.00
- **ESPERANTA ANTOLOGIO - POEMOJ 1887-1957**
Malmola bindaĵo. Bona stato. 640 pages. 1958. Originale verkitaj poemoj donas superrigardon pri la tuta poezia kulturo de Esperanto. Rimarku: Ne konfuzu ĉi tiun libron kun la pli malfrua libro, kiu inkluzivas poemojn de jaroj ĝis 1981. \$10.00
- **NANATASIS**
Robert Dutil. Paperback. Good condition. 114 pg. 2005. Trans. Zdravka Metz et al. A solitary traveler in a canoe, wounded in an accident,

- discovers an unknown world, forgotten values, a different life. And Nanatasis, an Abenaki woman living in the wilderness, learns to her surprise how her human brothers and sisters live. 20 full-page color illustrations. Includes short Abenaki-Esperanto vocabulary. \$12.00
- ENPRIZONIGO
César Barros LEAL. Mola bindaĵo. Bona stato. 149 pĝ. 2002. Faklibro pri enprizonigo, puno, kaj alternativaj rimedoj. Plejparte pri la prizonsistemo en Brazilo, Usono, kaj Japanujo. \$20.00
 - SALTEGO TRANS JARMILOJ
Jean Forge. Paperback. Good condition. 192 pages. 1973. One of the earliest original science-fiction novels in Esperanto. A group of time travelers journey to Nero's Rome. \$10.00
 - PROFETO EL PEDRAS, LA
Gersi Alfredo BAYS. Paperback. Good condition. 237 pg. 2001. The long-awaited first novel by the editor and publisher of the literature magazine and series of books *Fonto*. The story is fiction, but based on childhood memories of the author and is set in a small village, Pedras, which is now flooded from a hydroelectric dam. \$15.00
 - BATO, LA
Lena Karpunina. Paperback. Good condition. 125 pg. 2000. A collection of largely autobiographical episodes depicting life in Tajikistan, told in simple and fluent style that is easy to understand, and through which clearly shines the charm of the ordinary people living in the mountains, villages and cities. \$10.00
 - VOJAĜO EN HIROSIMA
Mola bindaĵo. Bona stato. 60 pĝ. 2007. Gvidlibro pri la monumentoj en la urbo. \$10.00
 - BELETRA ALMANAKO 5
Mola bindaĵo. Bona stato. 173 pĝ. 2009. Verkoj de Becker, Ragnarsson, Beza (trad.), Margarit (trad.), Eminescu (trad.), Kemény (trad.), Banet-Fornalowa, Tagor (trad.). Kelkaj recenzoj. \$10.00
 - KIEL AKVO DE L' RIVERO
Raymond Schwartz. Hardcover. Fair condition. 487 pages. 1991. This classic novel about a family torn apart by two world wars is both serious and amusing, as we expect from Schwartz, who was a wise comic. Corners are abraded. \$15.00
 - BILDVORTARO EN ESPERANTO
Desmet' kaj Horvath. Malmola bindaĵo. Ne tre bona stato. 800 pĝ. 2012. Verkego kun pli ol 30 000 terminoj kaj bildoj pri ilia aspekto. La sama libro estas havebla kiel nova varo. La kovrilo estas difektita. \$50.00
 - ASTERIX LA GAŬLO — VOL I
Gosciny kaj Uderzo. Malmola bindaĵo. Bona stato. 47 pĝ. Tradukis internacia tradukrondo. Asterix estas serio de bildstrioj, sufiĉe fama. Oni tradukis la serion en kelkajn lingvojn. \$20.00


Order from *Esperanto-USA*, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, or online [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

Honore al la memoro de David RICHARDSON

Arlyn KERR

David RICHARDSON naskiĝis en 1926, kaj mortis je la fino de 2012, je aĝo 86. Li kreskis plejparte sur la insulo San Juan, Vaŝingtonio. Kiam li havis 14 jarojn li lernis Esperanton; laŭ siaj propraj vortoj en *Kiu Estas Kiu* de 1947-8, li lernis “post ricevo de Esperanta ŝlosilo kaj legado de artikolo en *Boy’s Life*; lernis en klaso ĉe la urba biblioteko.”

Li vizitis la universitaton de Vaŝingtonio, kie li studis la rusan kaj aliajn lingvojn. Samtempe, li laboris kiel anoncisto en radio-stacio. Kaj li instruis Esperanton ĉe la universitato.



Kiam li estis dekokjara, en 1944, li aniĝis en la armeo por la finaj monatoj de la dua mondmilito. Li estis en la infanterio. Post la milito li restis en Germanujo dum unu jaro por labori kiel anoncisto kaj inĝeniero en stabejo en Frankfurto. Kiam li havis 21 jarojn li edziĝis kun Myra Jo, kaj ili estis kunaj dum 65 jaroj. Ili havis du infanojn. David revenis al la universitato, kaj, laŭ la sama *Kiu Estas Kiu*, li denove laboris kiel radio-anoncisto, estis fak-delegito de Internacia Esperanto-Ligo pri Radio, havis ateston pri sia kapableco en Esperanto, faris

gramofonajn diskojn kun Esperantaj kantoj, estis prilaboranta tradukon de *La Rubaját* de Omar KAJJÁM, kaj estris la novan *Presejon Esperantistan de Seattle*. Li estis tre okupata junulo!

Li diplomiĝis en 1949. Li kaj Myra Jo translokiĝis al Vaŝingtono (DK) kaj Germanujo, kie David laboris por la CIA (Centra Inform-Agentejo) pri lingvoj kaj komunikado. Post kelkaj jaroj ili retranslokiĝis al la ŝtato Vaŝingtonio. David estis pionira televida dissendisto, por kanalo 11 en Takomo kaj kanalo 7 en Seatlo. Iam li havis sian propran infanan programon, nome *Inĝeniero Walt*. En tiu tempo li malsaniĝis pro poliomjelito, sed bonŝance postvivis tion.



Ĉe muzeo en Germanujo, 1972.


En 1959 li komencis labori por televida stacio en Bellingham; li laboris ĉe la dissendilo de kanalo 12 sur Monto Konstitucio sur insulo Orcas. Ekde tiam la familio loĝis en Orcas. Li emeritiĝis en 1988, sed eĉ poste li laboris unu aŭ du tagojn semajne, kiam oni bezonis lin, dum la sekvantaj dudek jaroj.

Davido verkis multajn librojn. Du temas pri la insuloj San Juan: *Magiaj Insuloj*, kaj *Porko-militaj Insuloj*. Ankaŭ *Puget Sounds*, kaj ilustrita historio de radio kaj televido en la nordokcidento. Inter esperantistoj, li estas fama por sia libro *Esperanto: Learning and Using the International Language* [<http://goo.gl/Ek5t9>], kiu kombinas historion,


lecionojn, kaj legaĵojn.

Liaj lastaj du libroj rilatis al Esperanto. *Shamrocks on the Tanana* [<http://amazon.com/dp/144145456X>] estas biografio pri Richard GEOGHEGAN. Geoghegan tradukis al la angla la “unuan libron” de Zamenhof, kaj estis unu el la originalaj fondintoj de la Seatla Esperanto-Societo en 1906. Samtempe Davido publikigis sian tradukon de *La Rubaját de Omar Kajjám* [<http://goo.gl/LfZ8e>] – jes, la sama verko kiun li komencis kiel studento antaŭ pli ol 60 jaroj.

Davido multe laboris por sia preĝejo, la komuna preĝejo de insulo Orcas. Li instruis en la dimanĉa lernejo, iam predikis, kaj



[<http://goo.gl/Ek5t9>]



[<http://goo.gl/LfZ8e>]

estis la historiisto.

Davido estis gravega persono en la Esperanto-movado, kaj tiuj en la nordokcidento estis bonŝancaj iam renkonti lin. Li donis sian kolekton de libroj kaj aliaj esperantaĵoj al la Biblioteko Culbert en Seatlo. Dum la usona/kanada kongreso en Sidney la Seatla grupo aŭkcios kelkajn rarajn aĵojn [<http://lrk.sdf.org/ses/aukcio.htm>] por helpi lian handikapitan filon.



Arlyn KERR

Arlyn loĝas kun sia edzo Les en Bellevue, Vaŝingtonio.

<arlyn@morsekob.org>

Three Little Words

D. Gary GRADY

The tiny words *da*, *po*, and *si* cause students of Esperanto trouble out of proportion to their size. None of them has an exact equivalent in English, and rules for using them can be confusing enough as to require some explanation. Even experienced speakers sometimes misuse them.

Da

Probably easiest is the preposition *da*, which is simple enough in concept: It's the preposition we use between a measure of quantity and whatever it is we're measuring. For example, "a liter of water" is "*litro da akvo*". This lets us distinguish between "*glaso de akvo*" and "*glaso da akvo*": The first means a glass with water in it (or a glass used for water) and the second refers to the quantity of water contained in a standard-size glass, whatever that might be. Admittedly, this is rarely an important distinction to make, but sometimes it can be useful — and it's not all that hard to grasp the idea. Students uncertain whether to use *de* or *da* in a phrase may want to imagine a corresponding question that the phrase answers. Is it asking about a quality (*de*) or a quantity (*da*)? As PMEG explains: [http://bertilow.com/pmeg/gramatiko/rolmontriloj/rolvortetoj/da/detalaj_reguloj.html]

- **Kiom** da soldatoj estis? – Estis grupo **da** soldatoj!
- **Kia** grupo ĝi estas? – Ĝi estas grupo **de** soldatoj!

It's possible to use *da* after relative or indefinite quantities as well as specific ones — "*pli da mono*", "*multe da birdoj*", "*iom da butero*", and so on. The quantity word shouldn't be omitted. To say "I bought some butter", we should use "*Mi aĉetis iom da butero*" and not just "*Mi aĉetis da butero*" as a French speaker might be inclined to phrase it.

While having to distinguish between *de* and *da* may be a novel idea for many students, it needn't be

confusing. Some students may be inclined to use the accusative after *da*, so as with any common error it's useful to point it out and give them practice in avoiding the mistake.

The real confusion comes from a rule that doesn't seem to make much sense: We use *da* only when the object of the preposition refers to something in general (e.g. "*faruno*") rather than a specific supply of it ("*la/tiu/mia faruno*"). So, to ask for a kilogram of flour we'd request "*unu kilogramon da faruno*", but if we want a kilogram of some specific stock of flour — say, a bag someone just bought — we instead ask for "*unu kilogramon de tiu faruno, kiun vi ĵus aĉetis*". That is, we'd use *de* rather than *da*, even though we're speaking of a quantity of something.

I have to admit that none of the explanations for this odd rule make a great deal of sense to me, but students need to be aware of the rule requiring *de* in place of *da* in such cases. Maybe it can serve as an example of how Esperanto isn't as different from other natural languages as one might have heard.

Po

The preposition *po* causes problems because it's so tempting to treat it as an Esperanto translation of the English "per". Alas, "per" has no equivalent in Esperanto (*en* or *por* probably comes closest), and *po* has no equivalent in English, at least not in terms of propositions.

Po can usually be translated "at the rate of", so "*po 100 kilometroj en horo*" means "at the rate of 100 kilometers per hour". Very often "*po ___*" is equivalent to "*___ each*" or "*___ apiece*". "I gave them 10 dollars each" could be translated as "*Mi donis al ili po 10 dolaroj*."

For English speakers, by far the most common mistake is something like "*Ĝi kostas du dolarojn po litro*"¹ or "*Ni veturis 60 mejlojn po horo*", but again *po* is not equivalent to "per". Those expressions should be "*Ĝi kostas po du dolaroj por*

litro” or “*Ni veturis po 60 mejloj en horo*”. It’s also common to use an adverb, as in “*Ni veturis po 60 mejloj hore*”. We can also simply replace *po* with the accusative, for example “*Ĝi kostas du dolarojn por litro*”, “*Ni veturis 60 mejlojn hore/en horo*”.

As a general rule, the object of *po* is in the nominative case as is usually the case (ha ha) with the objects of prepositions, and students should probably be encouraged to keep to that practice, but it’s worth noting that Zamenhof thought it was not necessarily an error to use the accusative after *po*. For a discussion of this and the nuances of other words used in expressions of quantity (such as *ĉirkaŭ*), see PMEG 23.6 [<http://bertilow.com/pmeg/gramatiko/nombroj/nuanciloj.html>].

It’s also possible to use *po-* as a prefix. *Popaŝe* means “step-by-step”, for example. Sometimes the prefix use can seem pretty close in meaning to the English “per”, as in *vendi politre* (“to sell by the liter”) or *lui ponokte* (“to rent by the night”). The entry on *po* in the Plena Ilustrita Vortaro is worth careful reading.

Si

The reflexive pronoun *si* has some of the most complicated usage rules in Esperanto, and I’m not going to try to describe them in complete detail here. In brief, however, *si* is a pronoun that refers back to the subject of the relevant verb, to the whole subject, and to nothing but the subject (as Montagu Butler put it in *Step by Step in Esperanto*), and it’s used only in the third person.



An image from one of the many free teaching materials (this one from Przemysław Wierzbowski on the reflexive pronoun) at edukado.net [<http://edukado.net>].

Si can often be translated as “himself”, “herself”, or

“themselves” but that doesn’t mean that the English words are equivalent. For example, “he himself” would be “*li mem*” in Esperanto, not “*li si*” (which doesn’t actually make sense).

Sometimes *si* can mean “each other” as in “*Ili kisis sin*”.

Si often removes ambiguity, especially in its possessive form. In English “He saw his friend” can mean that he saw his own friend or that he saw someone else’s. In Esperanto, “*Li vidis sian amikon*” always means he saw his own friend, and “*Li vidis lian amikon*” always means he saw someone else’s friend. As that example implies, using *si* (or *sin* or *sia* or *sian*) is usually not optional. If you can use it, you must.

The “subject” here refers to the simple subject. In the sentence “*Karlo kaj Johano alvenis*”, *Karlo kaj Johano* constitute a two-person simple subject, but in “*Karlo alvenis kun Johano*”, the subject of the verb is just *Karlo*, even if you rearrange the word order to “*Karlo kun Johano alvenis*”.

Since *si* refers to the whole subject, *si* can’t itself be part of the subject. You can’t for example say “*Karlo kaj sia amiko alvenis hodiaŭ*” because the subject is both *Karlo* and *lia amiko*, so *sia* would refer to both of them. On the other hand, “*Karlo alvenis hodiaŭ kun sia amiko*” is OK, as is “*Karlo kun sia amiko alvenis hodiaŭ*” because in that sentence the subject is “*Karlo*”.

To complicate matters, not just verbs but participles as well can have subjects, often implicit ones.

Consider the sentence “*Releginte sian eseon, Gary decidis sendi ĝin al la redaktoro malgraŭ ĝiaj mankoj.*” (“Having re-read his (own) essay, Gary decided to send it to the editor despite its shortcomings.”) Here the participle *releginte* is an adverb that modifies the main verb of the sentence and has the same subject. Sometimes the subject of a participle is stated explicitly, as in “*Ne al glavo sangon soifanta...*” and on occasion such a phrase could include the use of *si*, as perhaps in “*Ne al aktoro sin amanta...*”.

Exactly how deeply an instructor should get into this clearly depends on the course and the level of the students. Fortunately, the more esoteric

examples are almost always clear enough when you hear or read them, and most of us are unlikely to use them in speech or writing, so in practice a basic understanding is sufficient, and if someone does make a mistake, it's unlikely the mistake will be noticed. As Zamenhof observed in *Lingvaj Respondoj*, we don't have to get obsessive about this stuff. (I'm paraphrasing.)

Useful references

The latest revision of *La Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG)* [<http://bertilow.com/pmeg>] can be consulted on the Web. An excellent English-language reference is Montagu C. Butler's *Step by Step in Esperanto* [<http://goo.gl/dWwZG0>], available from the *libroservo*. Other useful online references



are the *Reta Vortaro* [<http://reta-vortaro.de>] and the *Plena Ilustrita Vortaro (PIV)* [<http://vortaro.net>]. The latter requires you to sign in with your *lernu.net* account.

1. In writing on grammar an usage, an asterisk commonly denotes a bad example to be avoided. I should probably wear an asterisk pin in addition to my green star.



D. Gary GRADY

Gary is editor of the bulletin of the American Association of Teachers of Esperanto. He lives in Durham, NC.

<dgarygrady@frontier.com>

senintenca esperantaĵo?

Ĉu vilaĝo efektive vizitinda?

Christopher ZERVIC



Dankon al Chris ZERVIC pro lia foto el la Adirondakaj Montoj de Novjorkio. En siaj vojaĝoj, Chris foje trapasas simile allogajn vilaĝojn — ekzemple la trankviligan Murdo, en Suda Dakoto.

Raporto de la Mez-Kanada Renkontiĝo

Margo COHEN

Okazis Mekaro (Mez-Kanada Renkontiĝo) ĉi-jare en Ŝerbruko, Kebekio, mezgranda urbo kiu situas oriente de Montrealo, kaj rekte norde de Vermonto. Tiu kunveno okazas ĉiujare, dum la tria semajnfino de Majo, aŭ en Kebekio aŭ en Ontario, ĉiam en malsama urbo. Oni elektis tiun semajnfinojn ĉar en Kanado la sekva lundo estas registara ferio, do tre konvenas por la plejparto de la partoprenantoj. Ĉi-jare, de la 17-a ĝis 19-a de Majo, 40 partoprenantoj ĝuis amikan kaj vigan etoson, belegan lokon, ĝuindajn ekskursojn kaj bongustajn manĝojn.



La partoprenantoj de Mekaro-2014. Foto danke al Ĵenja AMIS.

Mi estas sufiĉe nova esperantulo kiu loĝas en Vaŝingtono, do oni povas demandi, kial mi decidis vojaĝi al tiu fora aranĝo? Fakte, mi tre admiras ESK-on (Esperanto-Societon de Kebekio) kaj pro ĝia vigeleco kaj pro la aktivaj anoj. *La Riverego* [<http://esperanto.qc.ca/eo/riverego>], ilia retĵurnalo, estas ĉiam tre interesa kaj leginda. Kaj Kebekio estas bela, aparte dum printempo kaj somero. Mi scivolis, ĉu mi povus iom plibonigi mian lingvokapablon tie, dum mi renkontiĝas kun novaj konatoj.

Kiam mi alvenis, Trefleo (Trefflé) MERCIER salutis min. Li estas unu el la kvar esperantistoj kiuj loĝas en Ŝerbruko, kaj kiel kunordiganto li faris la

plejmulton de la antaŭpreparado. La aliaj membroj de la loka klubo estas Ian WHEELER, la sperta estro de la Mekaro-retejo [<http://www.mekaro.ca>], Ĝeraldo (Gérald) CÔTÉ, la kasisto, kaj Bruno PELLETIER, la ŝoforo por tiuj kiuj venis aŭtobuse. Trefleo komencis plani antaŭ pli ol unu jaro. Plej malfacile por li, li diris al mi, estis plani la ekskursojn kaj manĝojn. Li devis plani kaj por la eblo de pluvo, kaj por pluraj vegetaranoj. Ofte pluvas en Kebekio dum Majo, kaj en Kebekio, ne ĉiu restoracio havas vegetarajn elektojn.

Eliza (Elizaveta) LISOVSKAYA, 24-jara, el Otavo, estis la dua kiun mi renkontis je mia alveno ĉe Bishop's University, la sidejo por Mekaro. Kiom mi miris, kiam mi eltrovis ke, kvankam ŝi eklernis Esperanton nur antaŭ tri semajnoj, ŝi jam parolas kaj komprenas tre bone. Ŝi uzis nur libron pri Esperanta gramatiko, kaj neniam parolis Esperanton antaŭ ol ŝi alvenis al Mekaro! La ĉefa kialo por ŝia decido ekstudi Esperanton, diris al mi tiu rusdevena junulino, estas la nuna politika situacio en Ukrainujo. "Mi volas la pacon", ŝi diris.

Kune ni alvenis la dormejon, kiu estas tre komforta, kvieti, kaj pura konstruaĵo, kun privataj ĉambroj en modernaj apartamentoj. Ĉiutage ni matenmanĝis kune en la moderna manĝejo de la Universitato. La ekskursoj estis tre ĝuindaj kaj interesaj. Inter aliaj, ni vizitis la Lac des Nations, la imponan Gorge de la rivière Magog, Savon de Cantons (fabriko de sapo, kies proprietulo montris al ni kiel oni faras sapon), la ĉarman vilaĝon de North Hatley kaj la Muzeon pri Naturo kaj Sciencoj, kie ni spektis interesan filmon pri la historio de la Tero. La manĝoj en diversaj restoracioj estis tre bongustaj. Feliĉe, la vetero estis plejparte belega! Dum ĉiuj agadoj ni parolis multe inter ni, kio estis bonega sperto por mi, kaj helpis min plibonigi mian kapablon pri kompreno kaj parolo.

Dum la unua distra vespero ni ĝuis prezentaĵon de Ĵenja AMIS pri japana kulturo, pri kiu ŝi kaj Joel, la edzo, lernis dum dumonata vojaĝo pasintaŭtune. Ĵenja distris nin per amuzaj kaj informaj anekdotoj

kaj priskriboj pri japanaj kutimoj kiuj tre malsimilas al la niaj, kaj montris al ni fotojn. La duan vesperon, Joel, kiu estas ESF [*Esperantic Studies Foundation*] -Administranto, parolis pri Nord-Amerikaj Esperantaj organizoj kaj projektoj. Poste, Jed MELTZER gvidis tre amuzan ludon por ĉiuj; temis pri kvar “Perfidaj Idistoj” (elektitaj sekrete de Jed) kiuj luktis kontraŭ “Honestaj Esperantistoj”; Tiuj kvar malbonaj partoprenantoj “mortigis” aliulojn “dum la nokto” (fakte, dum paŭzaj en la ludo). La venontan matenon, ni daŭre diskutis la ludon, aparte pri la ridiga parto, kiam Normand FLEURY, prezidanto de la Esperanto-Societo de Kebekio, akuzis sian propran edzinon Zdravka METZ pri “perfido” pro tio ke ŝi silentis dum la ludo. Nu, li pravis!

Tre kuraĝiga aspekto de la renkontiĝo estis la granda nombro de junuloj kiuj ĉeestis. Inter ili estis Nicolas VIAU, 28, fluparolanto el Montrealo, kiu esperantistiĝis antaŭ kvin jaroj, ĉefe pro scivolemo, lingvemo kaj siaj intereso pri internacia komunikado, lingva egaleco, kaj la situacio pri la franca lingvo en Nord-Ameriko. Pasintjare en Slovakujo li ĉeestis SES-on (Somera Esperanta Studadon), kiu helpis lin pliboniĝi pri la lingvo. Li nun verkas artikolon pri Mekaro por *La Riverego*. Larry (Laŭrenco) KENNY, 25, de Kembriĝo, Masaĉuseco, ankaŭ estas fluparolanto, kvankam li ekstudis Esperanton nur antaŭ tri jaroj kaj ne vere ekparolis ĝis pasintjare ĉe NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro). Lia nova, originala serio de video-elsendoj “legu, aŭdu, vivu” [<http://goo.gl/EQ4V9x>] traktas Esperantan literaturon, muzaikon, kaj aliajn interesajn temojn; Dum promenado tra la urbo, li petis min pri proponoj por literaturaj verkoj kiujn li

povos pridiskuti dum venontaj elsendoj.

Krom Eliza, ankaŭ Laetitia (Letisja) BERT, 22-jara franca studentino kiu nun studas sociologion en Montrealo, venis al Mekaro unuafoje. Tiu denaskulino lernis Esperanton kiel bebo de siaj gepatroj en Briançon, franca urbo apud la itala landlimo, kie neniuj aliaj esperantistoj loĝis. Ŝi kaj la du gefratoj daŭre parolas la lingvon. Ŝi mem estas komitatano de la franca junula organizo JEFO, ĉe TEJO [*Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*]. Ŝi trovas Esperanton tre praktika por vojaĝi, por studoj, kaj por kontakti aliulojn. “Mi volas danki miajn gepatrojn por la granda donaco kiun ili donis al mi. Se vi havas la eblon instrui Esperanton al viaj infanoj, nepre faru tion!” Ŝi konsilas.

Pro la vigla partopreno de multaj junuloj, la ĉeesto de multaj aliaj entuziasmaj esperantistoj, kaj dankon al la granda laboro de la kunordiganto Trefleo MERCIER kaj liaj helpantoj, Mekaro-2014 estis granda sukceso. Kia bonega renkontiĝo! Venontjare, ĝi okazos en Toronto. Mi nepre provos vojaĝi tien por partopreni Mekaron-2015!



Margo COHEN

Margo esperantistiĝis antaŭ 18 monatoj. Ŝi estas kuracisto kiu loĝas en Vaŝingtono, DK. Ŝi ĝuas legi, triki, vojaĝi, kaj instrui kiel lingvohelpanto ĉe Lernu.net. Pro ŝia foto ĉi tie ni dankas al profesia fotisto David COHEN, ŝia edzo.

<ruth3209@gmail.com>

Pasio

Orlando E. RAOLA

Finiĝis la lernojaro. Por mi estis ege intensa laborperiodo, des pli ĉar mi foruzis sufiĉe signifan parton de mia nelabora tempo por esperantumado (pri kio mi absolute ne plendas!). Bonŝance mi mergiĝas nun en la someran feriadon. Mi konfesas, ke dum la lastaj kvin jaroj mi sentis neniun emon engaĝiĝi en la laboroj de la somera lernoperiodo en mia altlernejo. Libertempa somero certe ebligas al mi serioze okupiĝi pri mia ŝatokupo: Esperanto. Tiu ĉi somero verŝajne estos plenplena je tio, kaj mi jam ve-sopiretas, ke ĝi ne estos sufiĉe longa por sukcesigi ĉion, kion mi volus fari.

Samtempe ni eniras la finan monaton de mia unua deĵorperiodo kiel prezidanto de la Asocio. Dum mi verkas tiun ĉi artikolon, vi eble jam sendis vian plenigitan balotilon al la centra oficejo. Se vi ankoraŭ tion ne faris, bonvolu tuj fari, eĉ se tiucele vi devos renovigi aŭ starigi vian kotizon al Esperanto-USA! Nur se absolute ĉiuj asocioj partoprenas la demokratian procezon ene de la asocio, klare starigitan de nia statuto [<http://kulturo.net/retejo/statuto.pdf>], ni povos certigi ke ni atingos sukcese niajn celojn.

Mi rekandidatiĝis por esti prezidanto dum dua deĵorperiodo, kaj mi esperas, ke mi daŭre havu la ŝancon servi al la asocio kaj al la asocioj el tiu ĉi posteno. Sed fakte, ne estas posteno kiu gravas por kontribui al la plena disvolvo de Esperanto nialande kaj tutmonde. Sendepende de la rezultoj de la balotado, mi esperas dediĉi sufiĉan tempon al pluraj organizaĵaj taskoj: baldaŭa funkciigo de nia nova retejo (dankon, Hoss!), organizado de kongresoj kaj renkontiĝoj, daŭrigo de la intenseco kaj ofteco de la usona partopreno en la internacia movado.

Tutcerte vi ne forgesis mian promeson esplori la ideon venigi la Universalan Kongreson de Esperanto al Usono. Tiurilate, dum la landaj kongresoj mi sukcesis kunigi grupon de proksimume 25 aktivuloj, kiuj pretas kunlabori. (Dankon, aktivuloj!) Ĉe la UEA-flanko, la rezultoj de la esplorado estis iom malpli entuziasmigaj. Mi ne volas diskonigi detalojn ĉi tie, sed mi diru nur, ke ekzistas kvazaŭ nesribita


regulo pri la ofteco de la kongresoj sur la eŭropa kontinento... Bone, 2015 kaj 2016 jam estas deciditaj kaj temas pri eŭropaj kongresoj. Pro ĉio ĉi, mi volas aperi en Bonaero la 25-an de Julio kun konkreta propono ĉe-mane por **okazigo de la Universala Kongreso de Esperanto en Usono en Julio-Aŭgusto 2017**. Al la lokoj, kiujn ni esploris ĝis nun (San-Francisko kaj San-Diego, en Kalifornio), devas aldoniĝi sinproponoj ricevitaj de la lokaj aŭtoritatoj de Houston, Teksaso kaj Vaŝingtono, DK. Mi ankaŭ emus aldoni sudan Floridon, eble Fort Lauderdale, kie plej verŝajne ni havos nian landan kongreson en 2016. Do, jen tujuja tasko, la estrara kunsido kaj finfine la kongreso de ĉiuj usonaj esperantistoj en Viktorio, Brita Kolumbio, espereble decidus pri tiu ĉi afero.

Alia afero pri kio mi intense okupiĝas ĉi-momente estas la aktivigo kaj sukcesigo de la fonduso Amikeco Translimen. Vi certe spertis la rezultojn de nia agado pasintjare, kiam ni sukcesis venigi la kubanon Rikardo SALAZAR al NASK kaj la kongreso en Raleigh, Norda Karolino. Ĉi-jare la plano estis multe pli ambicia, ĉar temis pri vojaĝigo de juna studento kaj elstara esperantisto el Irano. Por faciligi la kontribuadon de ĉiuj asocioj kaj simpatiantoj de Esperanto en nia lando kaj tutmonde, mi starigis retejon ĉe Indiegogo [<http://igg.me/at/amikeco/x/2549236>] kie iom malrapide sed tute stabile ariĝas la kontribuoj de ĉiuj bonkoraj samideanoj por sukcesigo de tiu ĉi komun(um)a revo. Ĉu vi jam vizitis la retejon? Ĉu mi enmetu vian nomon sur la liston de la dank-leter-ricevontoj? Ĉar donacintoj ricevos mane skribitan dankon de *Yours Truly*. Almenaŭ tion mi povas fari...

Bedaŭrinde, antaŭnelonge ni ricevis sciigon, ke la kanada registaro rifuzis doni enirvizon al nia invitito por veni al NASK kaj la kongreso ĉi-jare. La fonduso daŭre kolektos viajn kontribuajojn, kaj espereble venontan jaron ni sukcesos por niaj aranĝoj en Detrojto.

...

Hodiaŭ mi ĵus ricevis mesaĝon de studentino, kiu finis duonjaron studadon sub mia gvidado. Mi volas libere traduki frazon el ŝia mesaĝo por vi, ne por malmodesti (nu, eble ete malmodesti?) sed ĉar la mesaĝo estas profunda kaj valore pensiga ankaŭ por nia poresperanta agado: “Estas multe pli facile dividi sciojn ol dividi pasion, sed vi dividas ambaŭ kun infekta kaj multe prezata entuziasmo”. Ĉu ne bona slogano por sproni nian agadon? Estu infekto entuziasma pri via pasio kaj scio rilataj al la Internacia Lingvo Esperanto.



Orlando E. RAOLA

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio.

<oraola@gmail.com>

leterkesto

Ĉu la fina venko?

The mysterious Georgia Guidestones have caused a lot of speculation since their appearance in 1980. Many people believe that the writing on the stones which are megalithic slabs of quarried granite are the unknown author’s version of how to create a New World Order.

Of interest to us Esperantists is the third of the ten guiding rules. Unite humanity with a living new language. What language did the author have in mind? Perhaps the monument itself will give us clues.

The four-sided capstone (I took my facts from the Wikipedia article on Georgia Guidestones [http://en.wikipedia.org/wiki/Georgia_Guidestones]) has inscriptions in four languages: Classical Greek, Babylonian, Egyptian hieroglyphics and Sanskrit. The unifying world language cannot be one of these for they are neither new or living.

The four erect slabs have writing in eight modern languages: English, Spanish, Swahili, Hindi, Hebrew, Arabic, Chinese and Russian. They are

truly living languages, but they are not new.

The proposed unifying world language guided by reason should be new or distinct from ancient or modern ethnic languages. It should be culturally neutral and champion the brotherhood of all mankind. Its motto should be liberty, justice and equality, the ideals of the French and American Revolutions. It should be currently spoken as a living language by many people all over the world. I wonder what language would best fulfill these Georgia Guidestones requirements?

— *Werner (Venero) MOELLER*,
<wernermoeller@verizon.net>

Skribu al *Usona Esperantisto!*

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri io lastatempe aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, ne pli ol 400. Sendu mesaĝojn al la redakcio.



Raporto de la Simpozio pri Lingvo kaj Egaleco

Humphrey TONKIN

NOVJORKO, mardon, 29-an de Aprilo 2014 — La simpozio, ĉe Church Center, 777 United Nations Plaza, Novjorko, okazis sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), la Laborgrupo pri Lingvoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj la Universitato de Hartford. Universala Esperanto-Asocio rolis kiel la gastiga organizaĵo, kun parta subvencio de Esperantic Studies Foundation. UEA kaj CED jam en pasinteco organizis similajn aranĝojn, plej laste antaŭ du jaroj.

Aliĝoj. Entute 83 personoj aliĝis, el kiuj 14 ne ĉeestis. Plia seso da homoj ĉeestis individuajn partojn de la program sen aparta aliĝo. Inter la aliĝintoj estis reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj, oficistoj de UN, universitatoj, profesiaj tradukistoj, anoj de UN-misioj, kaj aliaj lingvolaboristoj.

Malfermo. Malfermis la programon: Lia Ekscelenco Philippe SAVADOGO, Ambasadoro kaj Konstanta Reprezentanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj de la tutmonda komunumo de parolantoj de la franca lingvo, la tielnomata Frankofonio; kaj sinjorino Françoise CESTAC, iama Asista Ĝenerala Sekretario de UN pri Konferencaj Servoj. Humphrey TONKIN, de la Universitato de Hartford, iama prezidanto de UEA, prezidis la simpozion.

Inaŭgura parolado. La inaŭguran paroladon prezentis Mark FETTES, de la Universitato Simon Fraser, Kanado, nuna prezidanto de UEA, kiu emfazis la gravecon de la lingvoj kiel faktoro en internaciaj aferoj ĝenerale kaj daŭripova evoluigo specife. Li atentigis, ke UN donas malmultan atenton al lingvaj demandoj. Tiu manko de atento kondukas al ĝia emo, en multa ĝia laboro, funkcii desupre malsupren anstataŭ demalsupre supren.

Referaĵoj. Entute, dekdu pliaj referaĵoj estis prezentitaj de fakuloj kaj aktivuloj el ses landoj:

- Lisa McENTEE-ATALIANIS, de la Londona Universitato, alfrontis problemojn en la apliko de la oficiala multlingvisma politiko de UN,

specife en la ekzemplo de la Internacia Martrafika Organizaĵo.

- Britta SCHNEIDER, de la Libera Universitato Berlino, esploris la simbolajn funkciojn de la lingvoj preter etnaj demandoj, donante apartan atenton al popularaj uzoj de lingvoj, precipe en populara muziko.
- Terrence G. WILEY kaj M. Beatriz ARIAS, de la Centro por Aplika Lingvistiko (Washington, DC), ekzamenis la limigojn truditajn al edukado kiel homa rajto pro neegaleca lingva leĝfarado kaj praktiko en Usono.
- Esther SCHOR, de la Universitato Princeton, retrorigardis al la fondiĝo de la Esperanto-movado fine de la deknaŭa jarcento kaj komence de la dudeka, en la kadro de la debato inter liberalaj memportataj rajtoj kaj la rajtoj de komunumoj.
- Yael PELED, de la Universitato de Montrealo kaj la Universitato McGill, ekzamenis la temon “Egaleco plurale: La lingvo kaj kompleksa egaleco,” en kiu ŝi pridemandis la terminojn *lingvo* kaj *egaleco*, montrante misperceptojn eventuale proprajn al ambaŭ.
- Daniel WARD, redaktoro de la usona periodaĵo *Language Magazine*, traktis la problemon de mondlingva edukado en la angleparolanta mondo, kie en lernejoj kaj universitatoj lingvostudado daŭre falas, precipe en Usono.
- Helder DE SCHUTTER, de la Katolika Universitato Leuven kaj la Universitato Princeton, esploris la implicojn de mondo, en kiu la proprietado de la angla lingvo transiras al dualingvaj parolantoj, kies neegaleca rilato al la angla naskas eventualajn nejustaĵojn.
- Rosemary SALOMONE, de St. John’s University,

Usono, alfrontis la implicojn de la kreskanta emo de universitatoj en neangleparolantaj landoj proponi edukadon en la angla, precipe en postdiplomaj studoj.

- Anshuman PANDEY, de la Universitato de Miĉigano, esploris tutmondajn komputajn normojn por lingvoj kaj skribsistemoj kaj la defiojn en klopodoj krei ekvilibran ĉirkaŭaĵon por uzantoj de ĉiuj lingvoj.
- Eva DAUSSÀ, de la Ŝtata Universitato de Novjorkio, Buffalo, proponis la ekzemplon de la kataluna kiel granda minoritata lingvo en pli vasta ŝtata kunteksto, kaj la malfacilaĵojn en kreo de egaleca lingvopolitiko, kiu konservas kaj plifortigas la minoritaton.
- Dipika MUKHERJEE, de Universitato Northwestern, ekzamenis religian identecon en rilato al lingvoj en Malajzio, montrante, ke oni nesufiĉe frontas la rilaton inter lingvo kaj religio, kaj atentigante, ke en Malajzio okazis

falo en la rolo de la angla kiel interlingvo.

- Andrea SCHALLEY kaj Susan EISENCHLAS, de Universitato Griffith, Aŭstralio, atentigis, ke en Aŭstralio la enlandan kreskon de multlingveco akompanas kvalita falo de la aranĝoj por tia multlingveco.

Ferma sesio. Fine, Mark FETTES gvidis ĝeneralan diskuton pri “tagordo por esploroj pri lingva egaleco.” Unu el la elementoj en tia tagordo, laŭ iuj partoprenantoj en la ofte vigla diskuto, devas esti esploro de la lingva situacio ene de UN mem.

Video. Ksenia PRILEPSKAJA kaptis plurajn referaĵojn videe kaj ankaŭ intervjuis plurajn partoprenantojn.

Venontaj paŝoj. Oni esperas, ke iuj referaĵoj el tiu ĉi eksterordinare produktiva simpozio povos esti kolektitaj kaj eldonataj. Oni nun diskutas tiujn eblecojn. Oni ankaŭ diskutas vojojn por aktivigi la Laborgrupon pri Lingvoj ĉe UN cele al alfronto de iuj demandoj supre menciitaj.

Apokalipse

Lee MILLER

Mi ne konsciis
en tiu tago
ke en la mano mi tenis
signalon de la fino
nek ke ilin mi devus
karesi kaj ami
pro baldaŭa malapero
kaj neniam reapero
Mi ne kredis
je fina Fino
aŭ se jes, ĝi venus
per fajro aŭ glacio
tertremo kaj inundo
Kiu pensus
ke en mia mano
grimpis la ŝlosilo
ke ili rapide mortus
sekiĝus
kaj post tio
unu post alia
malaperus la vivaj eroj
de nia mondo
aparte mankas al mi
la birdokantoj
kaj la fidela ĉeesto
de miaj hundo kaj kato
malplenas mia mondo
kiel mia stomak'

sed plendi aŭ plori vanas
kiam oni restas sola
sen esper'.



Fotis Ĵenja BONDELID.